



ESPERO KATOLIKA

KARAJ LEGANTOJ

Jen denove pli ampleksa numero de nia revuo: la bibliaj aldonoj aperas ĉiudumodate, sed nun vi ricevas ekstran aldondon rilate la enhavon de la Biblio. Mi esperas ke ĉiuj estos kontentaj kaj helpos nin, por efektiviĝi la regulan aperon de tiuj aldonoj. La bagatela sumo de 1 ned. Guldeno en tuta jaro, kiun ni petas aldoni al la ordinara kotizo, estas vere necesa por ebligi tiun eldonon kaj tial mi petas niajn membrojn, kiuj ĝis nun forĝesis pagi tiun aldondon — kaj la multegajn, kiujn ankoraŭ tute nenion pagis — plifaciligi nian taskon kaj tuj prizorgi tiun parton de sia devo de IKUE-ano.

Oĝte mi ricevas petojn, ke en E.K. aperu artikoloj pri iu speciale indikita temo. Ĉar mi ne estas kompetenta sur ĉiuj terenoj, kaj pro miaj jam tro ampleksaj taskoj ne prene ne disponas pri la tempo, serĉi kaj pristudi materialon rilate al tiuj specialaj temoj, tiuj petoj tre oĝte ne povas esti plenumataj. Evidente tro multaj el niaj legantoj pensas, ke E.K. estas komparebla al la diversaj landaj revuoj, kiuj disponas pri tuta stabo de kompetentuloj sur la plej diversaj terenoj, kies profesia kaj salajrigata tasko estas, kontentigi la dezirojn de la legantoj. Sed ankaŭ por ili tio estas neebla kaj cetere neniu postulas tion. Tamen mi oĝte pripensas ĉu niaj legantoj, kiuj emas skribi ke tiu aŭ tiu rubriko ne plaĉas al ili, ankaŭ sendas tiajn plendojn al siaj landaj gazetoj kaj revuoj, en kiuj ili ja ankaŭ sendube trovas multajn aferojn kiuj ne interesas ilin!

Kelkaj personoj plendas, ke E.K. estas tro „folkloro aŭ simila“; ili atendas de tempo al tempo iun artikolon pli profundfosan pri religiaj aferoj. Ankaŭ tiujn mi ne povas suĉi el mia dikŝingro, kaj mi petas niajn sacerdotojn, klopodi kontentigi tiun kategorion de legantoj. Cetere mi devas atentigi vin, ke E.K. kvankam katolika revuo, ne prene ne estas speciale religia, misia, kongregacia, teologia aŭ apologia gazeto, — sur tiuj terenoj la dumonata gazeto „Vojo, Vero, Vivo“ de I.K.I. estas pli specialigita — sed klopodas prezenti plej varian enhavon, kiu povas kontentigi se ne ĉiujn kaj tute, almenaŭ multajn kaj grandparte.

Tial mi urĝe petas al tiuj, kiuj deziras artikolojn pri specialaj temoj, serĉi ilin se eble en siaj naciaj gazetoj, kaj se vi trovis ion, kiu certe povos interesi internacian legantaron, vi sendu tion al via redaktorino. Neniam forĝesu, ke ŝia tasko ne estas, verki la tutan enhavon, sed ke tio estas tasko de ĉiuj kune: ni ne abonas revuon je sufiĉe alta kotizo, kies stabo devas zorgi por plej interesa enhavo, sed ni unualoke estas membroj de unuiĝo, kiuj pagas relative malaltan kotizon, por kiuj ni ricevas ankaŭ nian monatan organon. Ĉar la sumo de la kotizoj estas uzata por pagi la presiston, la aŝrankojn kaj ĉiujn elspezojn de la unuiĝo, kaj eĉ por la propagando de nia movado, nenio restas por pagi salajrojn de funkciuloj, do ni ĉiuj kune fakte devas zorgi por interesa revuo!

Oĝte mi legas raportojn pri okazintaĵoj en Esperantujo, eĉ sur pure katolika tereno, en aliaj revuoj: kial niaj membroj forĝesas ensendi tiujn sciigojn ankaŭ al E. K. ??

Feliĉe mi povas tiurilate konti je kelkaj — tamen tro malmultaj — fideluloj, kiuj regule ensendas sciigojn kaj artikolojn.

Mi dankas ankaŭ al tiuj, kiuj sendis donacojn por subteni nian aferojn; ĵus envenis gravaj subtenoj por E.K. kaj por Birdo de usona membro, kiu modeste malpermesas mencii nomon, sed kies efika helpo estas tre alte taksata.

Truus Durenkamp.

EMINENTULOJ PARTOPRENAS EN ESPERANTO-PROGRAMOJ DE LA VOĈO DE AMERIKO

Usonaj eminentuloj denove parolas Esperante en radio-programoj de la Voĉo de Ameriko. La 17-an de Marto membro de la Domo de Rezentantoj, S-ro Roman Pucinski el Chicago, faris tion jam la trian fojon. Li respondis al demando de membro de la Unua Ĉambro (Senato) de la Sveda Parlamento, S-ro Einar Dahl, pri senlaboreco en Usono kaj klopodoj por ĝia forigo. Kongresano (deputito) Pucinski antaŭ nelonge akompanis la novan Labor-Ministron Arthur Goldberg dum parto de vojaĝo, kiun li faris laŭ deziro de Prezidanto Kennedy por ekzameni la faktojn pri la ekzistanta senlaboreco kaj por prepari proponojn por la solvo de la problemo.

Unu el la plej eminentaj virinoj en la Kennedy-Administracio, S-ino Esther Peterson, Direktorino de la Virina Oficejo en la Ministerio de Laboro kaj Asistantino de la Labor-Ministro, parolis Esperante en la programo de la 24-a de Marto. Ŝi respondis al demando ricevita de S-ino Tyyne Leivo-Larsson, Finlanda Ambasadoro en Oslo kaj iam Ministro de Sociaj Aferoj kaj Vic-Ĉefministro de Finnlando.

La kvara serio de Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko, de la 17-a de Marto ĝis la 7-a de Aprilo, ankaŭ enhavas intervjuojn kun eksterlandaj observantoj. La 24-an de Marto Pastro D-ro J. B. Se-Tsien Kao, O.F.M., Ĝenerala Vikario de Fengsiang kaj Profesoro en la Fu-Jen-Universitato en Taipei (Formozo), aperis en intervjuo. Dum la pasintaj jaroj li loĝis en Rio de Janeiro, kie li aktive partoprenis en la Esperanto-movado kaj i.a. organizis la tre sukcesajn Esperanto-kunvenojn en la Eŭkaristia Kongreso de 1955. La 31-an de Marto similaj intervjuoj okazas kun D-ro Faruk Said Abuzzahab el Libano (nuntempe laboranta el la Psikiatra Klinikon de la Johns-Hopkins-Universitato en Baltimore) kaj kun la franca profesoro Jean Gazeau (nun kun la Franca Internacia Lernejo en Washington).

Eminentulo en la laborista movado, S-ro Mark Starr, kiu antaŭ nelonge revenis de kelkmonata laboro en Singapore en la servo de la Internacia Labor-Oficejo (ILO), parolos en la programo de la 7-a de Aprilo.

La Voĉo de Ameriko denove ricevis pli ol 200 demandojn el pli ol tridek landoj por sia programo de Demandoj kaj Respondoj. Ĝis la fino de Februaro 1961 ĝi ricevis pri siaj Esperanto-programoj proksimume 1420 leterojn el 81 landoj.

Anonco pri la Esperanto-programoj ankaŭ aperas en la ses anglalingvaj programbultenoj de la Voĉo de Ameriko: por Eŭropo, Afriko, la Meza Oriento kaj Latin-Ameriko. Oni atentigis pri la Esperanto-programoj en multaj nacilingvaj programoj de la Voĉo de Ameriko. Ankaŭ okazis specialaj intervjuoj pri la Esperanto-programoj. En litova lingvo oni intervjuis F-inon Clare Sponis, kiu estas Sekretariino de Kongresano Pucinski kaj kunlaboris en preskaŭ ĉiuj Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko. En hispana lingvo F-ino Carmen Torres intervjuis S-inon Consuelo de Sánchez Latour el Gvatemalo pri Esperanto en la sama tago, kiam D-ro Solzbacher intervjuis ŝin kaj ŝian edzon en Esperanto.



PAPDHIMNO

Vi, kiu portas la krucon de Krist'
vi, kiu estas la ĉefpaŝtist'
vi, kiu levas la torĉon de l' ver'
sen laciĝ' super mar' kaj ter'.
Forta leono antaŭ l' trezor'
estu al vi ĉiu laŭd' kaj glor'.

Vi, kiu kune suferas kun ni,
vundojn animajn sanigas vi,
vi, kiu montris al tuta ter'
amon kaj mildon en la mizer'.
Ĝoje el koro de am' kaj dank'
sonas la preĝo de nia kant':

Roko fidela en la pasem',
firma spirit' sen tim' kaj trem',
nek vin faligis la tondra mar'
nek la ventego kaj nek ondegar'.
Forte vi staru en brava obstin'
fulma atak' ne atingos vin.

Rekantajo post ĉiu strofo: Ho, Sankta Patro de l' Eklezi'
Jesuo Kristo estu kun vi
Li estu kun vi!

*Aperis en kajero de la Katolika Mezlerneja Junularo de Aŭstrujo.
Tradukis: Klaus Perko, Graz.*

Muziko mankas, sed oni certe trovos konatan melodion uzeblan. - Red.

PALMDIMANĈO

Kiel barokaltaraj anĝeletoj
pufaj nubetoj sur ĉielo pendas
kaj en amentaj molaj siluetoj
al mi salutojn palmdimanĉo sendas.

Lit' hospitala havas ankaŭ revojn:
Paskan orgenon mi image aŭdas,
parko preĝanta kiel brakolevojn
branĉojn etendas kaj ĉielon laŭdas.

Turdoj kaj merloj kaj fringetoj kante
vokas kun ŝvelaj sprosoj: Pasko, Pasko!
Kaj spir' printempa min revivigante
ŝarĝas la koron per sensolva tasko.

Jiri Korinek.

NI GRATULAS

Du el niaj polaj membroj ricevis la Sanktan Ordinon, nome: *Stanislao Skorczynski*
OMI — Misiistoj Oblatoj — en *Obra*, pow. Wolsztyn, woj. Poznán, la 19an
de marto pasinta;

Stefano Leks, Saska 2, Kraków, la 24an de marto pasinta en *Stadniki p. Myslenice*,
woj Krakowskie.

Ni sincere gratulas la novajn sacerdotojn kaj preĝas al Dio, ke Li riĉe benu ilin
kaj ilian apostolan laboron. *

Ni ankaŭ kore gratulas al nia multjara membro, ĉefstudkonsilisto *prof. d-ro E. J. Görlich*,
vicprezidanto de AKLE, Währingerstr. 59, *Wien IX*, Aŭstrujo, kiu estas
eknomita de la aŭstria ministro pri instruaferoj, d-ro Heinrich Drimmel, direktoro
de la „Ŝtata Ekzamenkomisiono por la Instrufako de la mondlingvo Esperanto”. *

LEGENDO PRI LA SANKTA KRUCO

Naŭcent tridek jarojn aĝa estis jam Adamo. Senforta pro aĝo kaj laboro li rememoris ĉiutage la vortojn de malbeno, kiujn diris la Sinjoro: „Fruŝvitita vi laboros por peco da pano, ĝis vi reiros al la tero, el kiu vi estas prenita.”

Fine, kiam li kuŝis mortmalsana, li vokis sian filon Seton kaj diris al li: „Mia filo, ŝajnas al mi, ke mi baldaŭ forlasos vin. Mi sentas la proksimiĝantan morton. Mi devas subiĝi al ĝi, ĉar ĝi estas la necesa sekvo de la peko. Iam mi vidis la mortintan Abelon, kaj nun estas proksima la horo, en kiu vi vidos la mortantan patron.”

Lia filo Seto ekploregis. „Mia patro,” li diris, „vi ne mortos. Certe ie en la mondo troviĝas kreskaĵo, kiu vin sanigos. Mi serĉos ĝin kie ajn ĝi estu. Mi trovos ĝin, eĉ se mi devus iri al tiu paradizo, pri kiu vi rakontis al mi tiom da belaĵoj kaj kie kreskas ankaŭ la arbo de la vivo. Jes, mi iros al la paradizo por certiĝi, ĉu tie kreskas la kreskaĵo kontraŭ la morto...”

„Ho, mia filo,” diris Adamo, „ĉu vi povus eniri la paradizon, el kiu forpelis min la Sinjoro en sia kolero? Eĉ se vi trovos la vojon al ĝi, vi bone scias, ke la pordegon gardas anĝelo kun fajra glavo.”

„Staru tie la anĝelo kun sia fajra glavo! Mi kortuŝos lin per miaj petoj! Adiaŭ, patro! Akompanu min via beno survoje... Mi iras, sed mi revenos kun la kreskaĵo, kiu vin sanigos.”

Seto forlasis la domon. Tramigris la tutan teron serĉante la arbon de la vivo kaj fine venis lacigita al la pordego de la paradizo. Tie haltigis lin tamen la Kerubo kun fajra glavo: „Reiru! Kion vi serĉas tie ĉi?”

„Mi estas Seto, la filo de Adamo. Mia patro estas malsana, li baldaŭ mortos. Mi volas ekvidi, ĉu la Sinjoro ordonis, ke en la paradizo estu kreskaĵo kontraŭ la morto.”

„Reiru, mia filo,” diris la Kerubo. „Tro malfrue vi serĉas la savantan kreskaĵon, via patro jam longe mortis... Tamen mi povas ion fari por vi. Mi donos al vi branĉon de l'arbo de la vivo; plantu ĝin sur la tombon de via patro! Kvankam Adamo jam estas enterigita, li sentos la forton de tiu ĉi branĉo, kiu donas esperon.” Seto prenis la branĉon. Li tamen esperis, ke la patro ankoraŭ vivas. Veninta kun la branĉo al la patra domo, li renkontis neniun. Jam delonge Adamo estis enterigita. Malgranda tomba monteto surkreskita per herbo montras kie la patro kuŝas. Sur ĝi li do plantis la branĉon. La branĉo enradikiĝis en la teron, kovranta la restaĵojn de la unua homo. Ĝi suprenkreskis sub la sunradioj, la ĉiela roso refreŝigis ĉiunokte ĝiajn verdajn foliojn. Kaj kiam ĝi estis plenkreskinta, ĝi disetendis larĝe siajn branĉojn, kovris per la ombro la tombon de la unua patro — patro de la tuta homaro.

* * *

Fine laŭ la decido de Dio plenumiĝis la tempo, en tiu memoriginda nokto, kies malhelo kovris la teruran agonion de Kristo, en kiu nokto la malamikoj volis Lin pereigi. Tiam ili faris el la ligno de la arbo krucon kaj metis ĝin sur la ŝultron de Kristo. Kiam Li kun siaj turmentantoj estis alveninta sur la supron de la monto Golgota, oni starigis la krucon profunde en la tero. La loko, kie devis plenumiĝi la martireco, estis la sama kie antaŭ multaj jarmiloj oni enterigis la korpon de Adamo. Kiam oni fosis la kavon, oni trovis liajn ostojn, kiuj tute disfalis. Nur la kranio ruliĝis sub la krucon kaj la sangogutoj elverŝitaj por la savo de la mondo, unue falis sur ĝin.

El: Kalendarz Franciszkanski, 1935.

Tradukis Jan Tomanek, Chorzów-Batory, Pollando.

SCIENCA INSTITUTO PETAS NIAN KUNLABORON!

Observu la eklipsiĝantajn stelojn sur la suda ĉielduono!

Ni instigas la personojn, kiuj — ne estante profesiaj astronomoj — havas eblecon uzadi la teleskopon, al observado de malfortaj sudaj eklipsiĝantaj steloj. Sur niaj stelokartoj (kiujn ni volonte sendos al vi) tiuj steloj estas markitaj. La helon de tiuj steloj oni devas kompari kelkfoje en la daŭro de ĉia sennuba vespero kun la helo de najbaraj steloj. Se vi rimarkos, ke la helo malgrandiĝis, bonvolu sendi mallongan informon pri tio, skribitan en laŭvola lingvo, *se eble en Esperanto*.

Ni petas vin, sendi al ni la adresojn de al vi konataj personoj, kiuj

a. loĝas en sudaj landoj;

b. posedas astronomiajn teleskopojn kaj kiuj

c. povus mem fari facilajn astronomiajn observadojn laŭ niaj instrukcioj aŭ kiuj

d. povus havigi siajn teleskopojn al aliaj amatoroj por tiaj observadoj.

Steloj eklipsiĝantaj distingiĝas per tio, ke ilia lumo neatendite malfortiĝas dum kelkaj horoj kaj poste tuj revenas al la antaŭa lumstato. Tia aperaĵo klariĝas simplamaniere. La stelo eklipsiĝanta, ŝajne simila al aliaj steloj, konsistas el du reciproke proksimaj steloj. Ambaŭ steloj ĉirkaŭiras unu la alian kaj ili ŝirmas sin reciproke en regulaj tempopartoj, ĉe unuj steloj post kelkaj horoj, ĉe aliaj post kelkaj tagoj. La tasko de la observanto estas, rigardi la stelojn ofte kaj ekkapti ilin dum eklipsiĝmomento. Tiaj observadoj estas tre facilaj kaj krome tre emociigaj. Ili donas al la observantoj multan kontentiĝon.

Tiajn observaĵojn ni povos utiligi por la sciencaj celoj kaj publikigi ilin, aldante la nomon de la observanto.

Adreso: D-ro K. Kordylewski, Astronomia Observatorio, Kopernika 27, Kraków, Pollando.

LA NOVA „INDEX TRANSLATIONUM” DE UNESKO ENLISTIGIS PRESKAŬ 30000 TRADUKOJN

Listo de 29 213 tradukoj en pli ol 200 lingvoj eldonitaj en 64 landoj, plejparte en 1958, troviĝas en la lasta dek-unua eldono de la „Index Translationum”, kiun UNESKO ĉiujare eldonas. La kosto de la 730-paĝa volumo estas 18,50 us. dol.; £ 4.12.6; 65 fr. fr.

Lenin restas la plej ofte tradukita verkinto en la mondo. En la pasinta jaro 209 tradukoj de liaj verkoj aperis, el kiuj la plej granda parto estas en la lingvoj uzataj en Sovet-Unio. Sekvas Shakespeare kun 127 tradukoj kaj Jules Verne kun 104, poste tri rusaj verkistoj: Tolstoj, Dostojevski kaj Gorki.

Aliaj verkistoj, el kies verkoj oni eldonis po pli ol 60 tradukoj, estas Simenon, Engels, Marx, Agatha Christie, Alexandre Dumas père, Erle Stanley Gardner, Zola kaj A. J. Cronin.

Po inter 50 kaj 60 tradukoj aperis el la verkoj de la jenaj verkistoj: Turgenjev, Conan Doyle, Hemingway, Dickens, Maupassant, Steinbeck, Ĉeĥov, Andersen, Pearl Buck, Jack London, Victor Hugo, Mark Twain kaj Somerset Maugham.

Inter la eldonintaj landoj, Sovet-Unio eldonis 4 458 tradukojn en siaj diversaj lingvoj, kaj Germanujo 2 513. Sekvas Ĉeĥoslovakujo kun ĉeĥaj kaj slovakaj tradukoj, Japanujo, Francujo, Nederlando, Rumanujo kaj Svedujo. Ĉiu el tiuj landoj eldonis pli ol 1000 tradukojn.

El la 29 213 tradukoj, pli ol 60 %, 16 293, estas fikciaĵoj.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Infomservo)

ESPERANTO VIVAS

ITALUJO. La vigla Katolika Esperanto-Centro en Romo kunvenas ĉiun dimanĉon; unue oni ĉeestas la S. Meson kun Esperanto-prediko en la kripto de la Pac-Baziliko „Kristo Reĝo” kaj poste renkontiĝas en du apudaj salonoj, disponigitaj de la paroĥestro, — la junularo nome okupas apartan salonon — por pritrakti la aferojn de la grupo.

La 4-an de marto okazis la inaŭguro de la *Viale dell' Esperanto* (Esperanto-Aleo) en Romo; la foto montras la momenton, en kiu la prezidanto, Patro Giacinto Jacobitti, benas la novan straton.




JAPANUJO. Ankaŭ ĉi tie oni fervore laboras. Certe la preparoj por la en 1965 okazonta Universala Kongreso dum la Olimpiado estas forta instigo. Japana sekcio de IKUE estas fondita; ni poste publikigos detalojn. La revuo „Esperanta Katoliko”, kiu dum kelka tempo ne aperis, reviviĝis. Adreso: S-ro Matubara Hatyrō, Nanmatutyō 602, *Kisiwada*. *

AŬSTRUJO. AKLE, Vieno, estas kiel ĉiam tre aktiva, sed ankaŭ en aliaj urboj kaj vilaĝoj regas vigla Esperanto-vivo. En Vieno kunvenis la grupanoj por memori la 20-an mortotagon de Patro Francisko Mestan, iama provincestro de la Patroj Piaristoj. Dum kelkaj jardekoj Patro Mestan estis oferema pioniro de nia movado; li estis multajn jarojn prezidanto de AKLE kaj de 1924 - 1928 prezidanto de IKUE. Li verkis preĝareton en Esperanto, kiu aperis en 1924 kaj dua eldono en 1933; kompilis rektan metodon por instrui Esperanton, aprobitan de la aŭstria instruministerio, kaj estis internacie konata kiel Esperanto-predikanto. Patro Mestan mortis je la aĝo de 76 jaroj, la 21.2.1941; lia tombo troviĝas en *Krems apud la Danubo*, kie li dum siaj lastaj vivjaroj modele plenumis siajn sacerdotaĵajn taskojn.

La 14.3.61 okazis speciala memorkunveno honore al mortintaj helpepiskopo d-ro *Josef Streidt* de Vieno kaj kardinalo *Josef Wendl*, ĉefepiskopo de Munkeno, kiuj ambaŭ estis grandaj simpatiantoj kaj akcelantoj de nia afero.

Pri la menciitaj okazintaĵoj kaj pri la katolika eldono de la Nova Testamento en Esperanto aperis raportoj kaj artikoloj en pluraj katolikaj revuoj kaj kelkaj gazetoj, sur kiu tereno nia membro s-ro *Karlo Dürschmidt* en Klagenfurt estis speciale fervora kaj sukcesa.



Ankaŭ individuaj s-anoj estas aktiva: nia nova membro f-ino *Anni Kosch* en *Traun apud Linz*, kiu fervore studas por akiri la E-diplomon. Iokigis verdan stelon sur sian leterkeston kaj fotografis la poŝtiston en la momento kiam li enkestigis nian revuon!

BRAZILLO. La vigla agado de la Esperanto-grupo „Semo” en la Seminario de *Monte Santo de Minas M.G.*, Caixa Postal 34, pri kiu ni jam kelkfoje raportis, senĉese daŭras. La multaj leteroj, kiuj venis el diversaj landoj, entuziasmigis niajn junajn samideanojn kaj ankoraŭ pli konvinkis la superulojn; la propandiloj kiujn oni sendis, bonege taŭgas por la konstanta ekspozicio. La estontaj sacerdotoj atendas ankoraŭ pli da leteroj kaj propagandiloj; ili mem dezegnis por sia korespondado poŝtkarton kun la portreto de d-ro Zamenhof, speciale por respondi al afablaj sendintoj de esperantaĵoj. *

ARGENTINO. En *Buenos Aires* niaj propagandistoj atingis ĉijare du rimarkindajn sukcesojn en la katolika medio. La ĉiusemajna gazeto „*Esquiú*”, la plej grava kaj plej multe disvastigita el ĉiuj katolikaj periodaĵoj, instalas fiksan rubrikon pri kaj en Esperanto, prizorgatan de la Argentina Esperantista Katolika Asocio.

Ni petas ĉiujn katolikajn samideanojn, sendi gratulleterojn aŭ poŝtkartojn al la Direktoro de *Esquiú*, *Resp. Sac. Luchia Puig a.a.*, H. Irigoyen 868, *Buenos Aires*, por konfirmi ke Esperanto estas vere gravega interligilo por la moderna katolikaro. Unu el la plej gravaj katolikaj institucioj en la lando, rilata kun la Katolika Universitato, la Instituto de Supera Religia Kulturo, enkondukis ĉijare Esperanton en unu el siaj fakultatoj, tiu de Homaj Interrilatoj, kiel provan nedevigan fakstudon, ĝis konstato de ĝia graveco kaj taŭgeco.

Por konvinki la estraron de tiu granda Instituto, ke Esperanto estas vere kaj fakte interhoma kontaktilo, ĉiuj katolikaj samideanoj bonvolu sendi gratulleterojn aŭ poŝtkartojn. Samtempe oni petas korespondantojn por la gekursanoj -komencantoj kaj progresantoj. Adreso: Esperanto-kurso de la Instituto de Supera Religia Kulturo, Rodriguez Pena 1054, Buenos Aires. Kursgvidanto estas Prof. D-ro J. A. Quina González, prezidanto de AEKA, psikiatro — fakisto en psikoterapio, kiu ankaŭ redaktas la artikolojn en *Esquiú*: la revuo, nomita laŭ la baldaŭ sanktigota argentina franciskano *Mamerto Esquiú*, estas vendata en ĉiuj paroĥoj de la tuta lando, kaj eĉ en najbaraj landoj. *

LA KARINTIA FOIRO — AŬSTRIA LIGNOFOIRO

La plej granda ekonomia ekspozicio de Karintio en Klagenfurt preparas jubileon. En la jaro 1961 okazos je la deka fojo la Karintia Foiro — Aŭstria Lignofoiro en Klagenfurt kaj ĉi tiu jubilea foiro donas certe motivon al rigardadoj, kiuj sekve de la daŭre favora evoluo de ĉi tiu aranĝo estas tute ĝojigaj. Certe la respondaj personoj esperis de sia ideo tian bonan estonton, tamen neniu estus kuraĝinta fari tian prognozon. Nuntempe, post dekjara evoluperiodo, oni povas fiere konstati, ke laborado kaj penadoj estis sukcesplenaj.

La Karintia Foiro komencis antaŭ jardekoj kiel Klagenfurta Aŭtunfestoj, fariĝis

Klagenfurta Ekspozicio, poste Karintia Landa Ekspozicio kaj finfine Karintia Foiro, kiu decidis, sian dinamikon, siajn instalaĵojn kaj siajn celojn, dediĉi al la ligno — grava ekonomia faktoro ne nur de Karintio, sed de tuta Aŭstrujo. Ne estas facile evoluigi fakfoiron preskaŭ el la nenio kaj estis ankaŭ ne facile akordigi la foje diverĝantajn unuopajn branĉojn kaj grupojn, ĉar tro multspeca estas la krudaĵo ligno, tro malsamaj estas ofte la intencoj kaj aspektoj de tiuj, kiuj okupiĝas pri ĝi en ĝiaj plej diversaj formoj. Malgraŭ tio la Karintia Foiro sukcesis en dek jaroj fariĝi faktoro de la aŭstria lignoekonomio, kiun devas atenti ĉiuj fakuloj en Aŭstrujo.

Sed la elradiiĝo de la Aŭstria Lignofoiro estas pli vasta. Tion ne nur montras la ekspoziantoj el 15 ŝtatoj kaj tri kontinentoj, tio montriĝas antaŭ ĉio ankaŭ en la konsisto de la foirpubliko, en kiu troviĝas — oficiale aŭ neoficiale — eksterlandaj fakuloj en ĉiam kreskanta nombro. Ĝuste nun, post kreo de la Eŭropa Valuta-Socio kaj de la EFTA oni donis al la Lignofoiro de la EFTA-lando Aŭstrujo vicon da specialaj funkcioj kaj la foiro de la jaro 1959 montris, ke ĝi kapablas tutplene plenumi ĉi tiujn funkciojn.

La Klagenfurta foirtereno donas la idealan lokon por aranĝaĵo de la rango de l' Aŭstria Lignofoiro. Ĝi disponas same pri sufiĉaj liberaj areoj, kiel pri halkonstruaĵoj; la tereno mem estas en unuaranga stato, kanalizita kaj asfaltita. La granda Urbo- kaj Foirohalo kun siaj 6000 kvadratmetroj da ekspoziciareo antaŭ nelonge estas finkonstruita.

Fine ankoraŭ kelkaj nombroj: La Aŭstria Lignofoiro havas meznombro ĉirkaŭ 1200 ekspoziantojn kaj preskaŭ 300.000 vizitantojn. En la jaro 1961 ĝi okazos de la 10a ĝis la 20a de aŭgusto.

La granda urbo- kaj foirohalo estas ankaŭ uzata por aliaj treege interesaj aranĝaĵoj de la Karintia Foiro: sur la artefarita glaciglitejo, instalita en ĉi tiu halo, regas dum 5 monatoj en la jaro vigla sportista vivo kaj la glacihokeo-vetludoj en Klagenfurt trovas regule entuziasmigitan vizitantaron. Dum la unua sezono de l'glacihalo oni nombris entute 172.000 vizitantojn, inter ili 75.000 ĉe la glacihokeo, 50.000 ĉe la gastludoj de la Viena Glacispektaklo, la reston ĉe la publika glitado kaj aliaj sportaj okazaĵoj, kiel arta glitado kaj glitdisko. Por la ekonomia situacio de Klagenfurt la Urbohalo do estas ankaŭ dum la vintro grava havaĵo.

(Laŭ raporto de la Foirofoicejo Klagenfurt esperantigis Dürschmid).

Ni petas niajn karajn eksterlandajn gelegantojn postuli de la „Direktion der Osterreichischen Holzmesse — Kärntner Messe“, Klagenfurt, Valentin-Leitgeb-Strasse 11, foirprospekton en Esperanto!



AFRIKO EKVATORA. La Apostola Prefektejo de *Moundou*, fondita en la sudokcidento de *Tchad* en majo 1951, altigita al diocezo en februaro 1959, etendiĝas sur teritorio de 61.500 kv.km., kie loĝas 500.000 homoj. Inter ili estas 38.000 katolikoj kaj 28.500 estas ricevantaj instruon en la katolika religio, 18.000 protestantoj kaj 13.000 mahometanoj. La ceteraj estas animistoj, kiuj montras sin tre malfermitaj por la katolikismo. Laboras tie 28 francaj kapucenaj patroj kaj 4 sekularaj sacerdotoj, 2 religiataj fratinoj kaj 25 fratinoj. *

SUDAMERIKO. En diversaj landoj de Eŭropo, en Usono kaj Kanado oni faras aranĝojn por grandioza helpagado al Sudameriko, kie la manko de sacerdotoj

estas maltrankviliga. En Hispanujo la Hierarkio fondis jam en 1948 specialan organizon por Sacerdota Kunlaboro kun Hispanameriko (OCSHA), kiu ĝis 1958 sendis pli ol 400 hispanajn sacerdotojn, kiuj pro la sama lingvo kaj simileco de kutimoj kaj psikologio kompreneble plej bone taŭgas por tio. En la 21 nacioj de tiu grandega teritorio laboras 33.500 sacerdotoj por 180 milionoj da loĝantoj; en la superaj seminarioj de tiuj landoj kune studas 5765 seminariistoj, sed estas bezonataj ankoraŭ 150.000 sacerdotoj, kaj tial oni streĉas ĉiujn fortojn por helpi kiel eble plej multe. La hispana Hierarkio fondis 4 teologiajn seminariojn por prepari estontajn sacerdotojn por Hispanameriko, nome en *Madrid, Salamanca, Zaragoza* kaj *Santiago de Compostela*. Kompreneble la diversaj Ordenoj kaj Kongregacioj, en Hispanujo kaj en multegaj aliaj landoj, kiuj jam ĉiam sendis siajn misiistojn, daŭrigas la elsendon kaj klopodas ĉiam plialtigi la nombron da misiistoj por Sudameriko. *

USONO. La katolikoj nombris 40.841.302 en 1960, tio estas 1.365.827 pli ol en 1959. Proksimume 5 milionoj da lernantoj studas en la katolikaj centroj de instruado, nome 4 milionoj en la elementaj, 850.000 en la mezlernejoj kaj 300.000 en universitatoj kaj altlernejoj. *

VIETNAMEO. Je la katolika universitato de *Dalat*, kie oni uzas la francan lingvon, estas enskribitaj 300 studentoj; oni devis rifuzi multajn pro spacomanko. Ankaŭ ĉe la multaj mezlernejoj katolikaj la alfluo estas konsiderinde pli granda ol la nombro de disponeblaj lokoj: entute studas tie 4000 lernantoj, el kiuj 20% estas katolikaj. *

AZIO-AFRIKO. El la 21.915 sacerdotoj de la „Propaganda Fide” 7.369, do la triono, estas indiĝenoj kaj el la 390 ĉefdiocezoj, diocezoj kaj vikariatoj, kiuj dependas de la P.F. jam 101 havas episkopon el la propra lando. 4500 indiĝenaj studentoj de filozofio kaj teologio preparas sin al la sacerdoteco en la pli ol 80 superaj seminarioj. *

TUTA MONDO. Laŭ la lasta statistiko la nombro de la katolikoj estis 490 milionoj, sesono de la tuta loĝantaro de la tero (2.930 milionoj). En la 5 mondpartoj: Eŭropo 210 milionoj da katolikoj je 450 milionoj da loĝantoj; Ameriko 220 milionoj je 400 milionoj da loĝantoj; Afriko 25 mil. je 260 mil.; Azio 34 mil. je 1800 mil.; Aŭstralio kaj Ocenanio 3.200.000 katolikoj je 17 milionoj da loĝantoj. En 1880 la tutmonda loĝantaro nombris 1325 milionojn, el kiuj 211 milionoj estis katolikaj.

A V E R I O

Sur stratkruciĝo homtumulto.
Kio okazis? Ho, ne multo:
Kun motorciklo karambolis
ŝarĝaŭto kaj en polv' stertoris
junulo en flaketo sanga
kun mortostamp' sur palo vanga.

Ekhaltis tramoj kaj trafiko,
gapantoj plenas de kritiko.
Alsagas aŭto sanitara,
kaj en aprila park' najbara
super junula agonio
disfloras ora forsitio.

Sed la trafik' ne darfas halti,
gapantoj kuras tramen salti
kaj ankaŭ mi laŭ dev' plu iru,
pri unu fin' eĉ ne tro miru...
Gazetnotico: Averio.
Kaj kelkaj versoj. Pli nenio.

Nur ie kaŝe ies koro
preskaŭ rigidos pro doloro.
Pro nesingardo de sekundo
sangados longe ies vundo
kaj iu larme rememoros
dum forsiti' printempe floros.

Jiri Korinek.

80.000 HOMOJ LIBERIGITAJ DE LA MALARIO

Kiam fortaj pluvoj venos super la Kenjan Nandi-regionon la nigraj homoj ne plu rigardos la proksimiĝantajn malhelajn nubojn kun ĉagreno en siaj okuloj. Male, ili ĝojos pri la pluvo kiu venos por reverdigi ilian landon.

Ankoraŭ antaŭ kvar jaroj la pluva tempo kaŭzis timon en la koroj de la Nandi-anoj. Timon, pro la demando kiu nun denove estos kaptata de la vipo de la lando; kiu nun denove ekhavas gravajn kapdolorojn, altajn febrojn, kiuj malrapide sed certe tiros la korpojn al la tombo. Timon, pro malgranda insekto kiu aktiviĝas, kiam la pluvoj venas: la malaria moskito (anofelo).

Antaŭ kvindek jaroj la Nandi-regiono ne konis la malarion. Oni eĉ ne sciis la vorton. Sed kiam la trafiko evoluis, la malsano povis ŝtele eniri en la landon.



Sangesploro en la batalo kontraŭ la malario.



La dieldrino estas sufiĉe maldensigita, do oni povas ekŝpruci

Ĝi venis el la sudokcidento de la Viktoria Lago. Ho, unue ĉio iris tre malrapide. Unu moskito kunvojaĝis en la pakaĵoj de rajdisto. Alia sin kaŝis en ŝarĝaŭtomobilo, kiu venis al la Nandiregiono por importi komercaĵojn. Tiel la moskitoj venis ĉe la Nandianoj. Tie ili trovis viktimojn, kiuj estis tute senarmaj kontraŭ la terura malario. Ĉirkaŭ la Viktoria Lago la homoj jam estas ĉe la naskiĝo ekipitaj per laŭnatura imuneco kontraŭ la malario, kiu akompanas ilin jam dum generacioj ekde de la naskiĝo ĝis la morta tago.

La Nanditribo tamen estis absolute nearmita kontraŭ la pikoj de la anofelo. Centoj da viktimoj falis kiam la malsano eksplodis. Miloj da Nandianoj mortis en la sekvintaj jaroj; ĝis kiam antaŭ kvar jaroj la ŝajne senespera batalo kontraŭ la malario komenciĝis. Estas rakonto pri kuraĝo, persisto, scienco kaj akurata planado. Rakonto verkita de la juna doktoro Roberts, de la sanecinspektoro Matson kaj de 90 nigraj kunlaborintoj, kiuj, en negastama teritorio, devis penetri milojn da mejloj antaŭ ol atingi la celon.

„Mi decidis fari klopodon por ataki la anofelon mem” rakontas D-ro Roberts. „Antaŭe ni jam laboris per grandaj kvantoj da daraprimo, sed tio havis nur mallongedaŭran efikon. La malario ĉiam denove atakis. Necesis maniero por mortigi la moskitojn kiuj estis en la lando, kaj zorgi ke ne envenos novaj el la sudokcidento.”

La batalo komenciĝis. UNICEF sendis 18.000 anglajn funtojn da dieldrino, nova rimedo, kiu laŭdire havas naŭmonatan efikon kiel insektmortigilo. Kiam oni



Unu el la nelacigeblaj helpantoj

surŝprucigas kabanon per dieldrino, la moskitoj do ne havos vivoŝancon tie dum naŭ monatoj. D-ro Roberts povis disponi tri monatojn, kiam la batalo komenciĝis, ĉar poste venos la pluvotempo kaj la anofelo vekiĝos. Dum tiuj tri monatoj oni devis surŝprucigi 36.400 Nandi-kabanojn. Tiuj kabanoj troviĝas dise en regiono de pli ol 81.000 kvadratmejlaj.

„Sen kunlaborado de la popolo ni neniam estus havintaj sukceson,” diras inspektoro Matson. „Kiam la Nandianoj aŭdis por kio ni venas, ili unuanime helpis nin. Ili alportis akvon, milojn da litroj, en potoj, ladskatoloj, oleuoj, k.t.p. por plimaldensigi la dieldrinon. Ili prizorgis nin en siaj vilaĝoj kiel siajn infanojn, donis al ni la plej bonan nutraĵon, zorgis pri fajroligno, donacis al ni kokojn, ŝafojn kaj legomojn.”

„Kaj jen ankaŭ niaj nigraj viroj”, diras D-ro Roberts. Unu fojon dek viroj estis pene irintaj dum la tuta tago de la sesa matene ĝis la sepa vespere. Jam malheliĝis kaj ili rapidis al la tendaro. Subite maljuna viro postkuris ilin. Li loĝis supre sur monto kaj lia kabano ankoraŭ ne estis surŝprucigita! Trankvile la viroj ko-

mencis la longan grimpadon supren por ankaŭ helpi tiun Nandianon." Per kvar jipoj, kelkaj azenkaravanoj kaj kun naŭdek nigraj helpantoj D-ro Roberts finis sian plej grandan batalon. Kiam la pluvoj denove falegis, ĉiu kabano estis surŝprucigita. Rezulto: nur kvar kazoj de malario dum tiu sezono! Ne ridu kiam vi en aŭtomobilo pasos moskitbarilon, kaj granda negro per malgranda reto serĉas moskitojn en via aŭtomobilo. Ĉar ankaŭ tiu ŝajna infanaĵo havas signifon. La anofelo neniam forrestos, se oni ne severe gardos kontraŭ „enmigrado" de novaj insektoj. Ankaŭ ĉi tiun jaron D-ro Roberts kun siaj ŝprucigistoj ekvojaĝos. Ĝis kiam ĉio estos sama kiel antaŭ kvindek jaroj. Tiam tamen oni konos la vorton „malario". Ĝi tremigos la maljunulojn... ĝi memorigos la junulojn pri juna doktoro kun mallarĝa vizaĝo kaj paro da inteligentaj okuloj post briletantaj okulvitroj.

El „Oost en West" tradukis „Amsterdamanoj."



38. *Lingva ĝangalo.* En la New York Herald Tribune oni antaŭ nelonge esploris la konstante pliiĝantajn disputojn inter la triboj en la centro de Afriko. — La gazeto venis al la rezulto, ke la precipa kaŭzo estas la eksterordinara lingvoĥaoso. En Afriko estas parolataj preskaŭ 700 lingvoj; parte temas pri tre primitivaj dialektoj, kiuj tute ne estas skribeblaj. Pli ol 95% de ĉiuj afrikanoj estas sekve analfabetoj. Kaj nur tiuj scipovas legi kaj skribi, kiuj kontaktiĝis kun arabaj kaj eŭropaj lingvoj. Ni prenas la sekvantan parton el la *New York Herald Tribune*: El la 700 en Afriko parolataj lingvoj nur tre malmultaj taŭgas por demokratioj kiel la ĵus sendependiĝintaj afrikaj ŝtatoj. En tiuj ŝtatoj ofte regas tia lingva ĥaoso, ke komuna

lingvo estas necesa.

Rimarkindaj esceptoj de la regulo estas la regionoj norde de la norda tropiko, kie la araba estas la landa lingvo. Kontraŭe al la plej multaj aliaj afrikaj lingvoj la araba lingvo estas tre civilizita popollingvo, tre preciza kaj taŭga por esprimi ĉiun sciencan kaj filozofian penson.

Baldaŭ post kiam Maroko fariĝis sendependa la registaro dekretis, ke la araba estu la instrulingvo kaj sekve la instruplanoj estis arabigitaj. Sed baldaŭ evidentiĝis ke per la sola araba neniun marokano povas superi la elementajn lerneajn konojn. Ĉar en gimnazioj kaj universitatoj oni instruas nur en franca lingvo. Pro tio oni ordonis la araban kaj francan kiel la instrulingvojn en ĉiuj lernejoj, kvankam tio signifas por la maroka kulturministrejo treegan malfacilaĵon.

Nuntempe por 725000 infanoj (38% de tiuj kiuj estas en lerneja aĝo) estas disponeblaj nur tre malmultaj instruistoj.

En norda Afrika certe restos la dulingva situacio; la franca estis kaj restas la lingvo de la elito. Pri tio la jena tipa ekzemplo:

Kiam antaŭ nelonge la tunezia prezidanto akceptis la marokan ĉefministron je la flughaveno, ambaŭ interŝanĝis la ordinarajn komplimentojn en la araba lingvo. Tiam diris *Bourgiba*: „*Parlons français, on se comprendra mieux*" = Ni parolu la francan, tiel ni pli bone komprenos nin". (El *Die Allgemeine Sonntagszeitung* 25/9/60 elprenis sro Willy Wirges).

39. „*Sprinto*" = (*rapidkurkonkurseto*) en kalsono.

Brita oficiro kunligita al la NATO-ĉefkvartalo por norda Eŭropo en Kosas apud Oslo ĉitempe faris en kalsono kelkajn rapidrondiretojn ĉar li emas resti

vigla. Foje li venis sur la terenojn de kliniko de spirite malsanuloj. Rimarkinte sian eraron li turniĝis kaj forkuregis de la tereno. Tiun momenton du gardistoj lin ekvidis. La aspekto de viro rapide rondkuranta en kalsono, evidente por ili estis tro stranga. Saltinte en aŭtomobilon ili ekpersekutis lin kaj ekkaptis la oficiron, dum li estis ankoraŭ sur la tereno. Liaj fortegaj protestoj en la angla lingvo, kiun ili ne komprenis, ankoraŭ pli konvinkis ilin, ke oni havas aferon kun frenezulo. La oficiro pro tio tuj estis enŝlosata. Nur post kiam psikiatro estis vizitinta la „pacienton”, la oficiro reakiris la liberecon. (El Leidse Courant 8/9 '60) Oni komparu i.a. n. 20 — sept. '60 kaj n. 18 — jul.aŭg. '60. Vi nepre sendu viajn interesaĵojn nur al paroĥestro C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO KANDIDATO POR LA NOBEL-PACPREMIO 1961

Pluraj ministroj, deputitoj de naciaj parlamentoj, filozofoj, historiistoj, profesoroj de Internacia Juro aŭ Politikaj Sciencoj kaj aliaj elstaraj personoj de dudeko da landoj faris proponon al la Nobel-Komitato en Oslo, ke U.E.A., kiel organizajo reprezentanta la tutmondan movadon por komuna Internacia Lingvo, ricevu la Nobel-Premion por la Paco por la jaro 1961. La multnombraj proponintoj motivigis sian proponon per la konsiderindaj rezultoj, kiujn atingis U.E.A. por la interkompreniĝo kaj proksimiĝo de la popoloj, kaj por la monda paco.

Al la propono estas aldonita abunda dokumenta materialo; oni plue akcentas la progresojn de la Internacia Lingvo, precipe en la lastaj 10 jaroj, ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ sur la aliaj kontinentoj; la gravecon de la abunda kaj daŭre kreskanta literaturo de Esperanto por la reciproka aprezado de la kulturaj valoroj de ĉiuj popoloj; la kunligan rolon de Esperantlingvaj gazetoj, revuoj, radioelsendoj; la multnombrajn kontaktojn de lernejoj kaj universitatoj per Esperanto; tutan aron da kulturaj manifestacioj kun pure internacia karaktero, ekzemple la Internacia Somera Universitato, belartaj konkursoj, artaj festivaloj ktp. En la propono estas donitaj koncizaj informoj pri la multflankaj aktivecoj de U.E.A., direktitaj al la monda paco, kaj estas speciale emfazata la humanisma laboro de tiu organizajo dum la du grandaj mondmilitoj.



Nur nun ni eksciis, ke nia multjara fidela membro, s-ro A. Eitner en Cleveland, Usono, mortis 22.12.1958. *

Msro. D-ro Antonín Eltschkner, helpepiskopo de Praha, Ĉeĥoslovakujo, unu el la Esperanto-pioniroj, mortis la 22an de februaro pasinta je la aĝo de 81 jaroj. Li estis dum jardekoj fervora membro de IKUE. *

La 7an de marto mortis, preskaŭ 80-jara, post longdaŭra malsano, s-ino Huberta Christina Beckers-Leyssens, Kwaadmechelen, Belgujo, la patrino de la IKUE-prezidanto. *

Ni preĝu, ke Dio donu al ili la eternan ripozon, kaj ni esprimas nian kunsenton al la parencoj.

La prezidanto de la Argentina Esperantista Katolika Asocio, d-ro J. A. Quina González, sciigis nin pri la subita morto, en la komenco de februaro 1961, de nia multjara membro kaj fervora reprezentanto por Argentino, s-ro Walter Przewolka, Buenos Aires. *



LA PATRO DE LA LEPRULOJ.

Originale verkis *Frato Arni Decorte*, reviziis *Frato Leotadio de Ruyver*. Eld. *Fratoj de l' Karitato*, Inst. S. Kamilo, Bierbeek, Belgujo, 1960, ilustr., 21,5 : 14 cm, 46 p, prezo 10 belg. fr. aŭ 2 resp. kup.

En plaĉa libreto kun bonaj fotoj la aŭtoro donas al ni la rakonton pri la heroo vivo de Patro Damiano de Veuster SS. CC, la flandra misiisto kiu dediĉis sian vivon al la lepruloj sur Molokajo.

La rakonto estas flua kaj simpla en ĝenerale bona lingvo. „Dio” aŭ „la Sinjoro” estas preferinda ol „Di-Sinjoro” p. 6; „oftfoje” estu „ofte” p. 7; „Re-

veninte en sia ĉeleto” estu kun n...n p. 8; Foje „liaj” estu „siaj” kaj „ilia” estu „sia” p. 11; „aflikta” estu „afliktita” p. 13; „Klemenso” estu „Klemento” p. 15. En la frazo: „Kelkajn minutojn poste la remiloj plaŭdas en la akvo forportante la episkopon al la velŝipo” la konstruo kaj la senco ne taŭgas, ĉar nek la remiloj nek la akvo forportas la episkopon, sed iu boato! p. 25. „realigitaĵoj” estu „rezultoj” p. 34.

Ni volonte deziras, ke multaj samideanoj legu kaj ĝuu la belan historion de tiu sankta viro. — *H. G. Wannemakers S. J.*

FESTOJ EN ARNHEM, NEDERLANDO, KAJ ESPERANTO-EKSPOZICIO

De la 15a de junio ĝis la 9a de julio estonta la mondkonata fabrikego de artsilko A.K.U. (Algemene Kunstzijde Unie = Ĝenerala Artsilko Unio) memorigos per grandaj festoj en Arnhem sian 50-jaran ekzistadon.

Kvankam A.K.U. ankaŭ havas fabrikojn en Aŭstrujo, Britujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo kaj Usono, ĝia centro ĉiam restis en Arnhem, kie ĝi estiĝis. Okaze de tiu jubileo estos grandaj festoj por la oficistaro, sed ne nur por ĝi. Estos festoj en la tuta urbo kaj ili altiros milojn da homoj.

Ĉar A.K.U. havas branĉojn en la supre menciitaj ses landoj la centro de la urbo Arnhem estos dividita en tiuj ses partoj. Oni ornamos la stratojn laŭ stratoj en tiuj landoj. En kunlaboro kun la oficejo por la festoj de A.K.U. la turistoficejo altiris specialiston por tiaj festoj, s-ron *Eshuis*, kiu havas spertojn tiurilate.

Nun la oficejo por la festoj de A.K.U. petis la esperantistojn, kunlabori en la festoj, substrekante tiel la internaciecon. Estos senpage disponigita al ili sufiĉe granda stando kaj krome ili ĉie povos propagandi per afiŝoj en la internacia lingvo.

Por realigi ĉion bone la Arnhemaj Esperantistoj petas helpon de enlandaj kaj eksterlandaj samideanoj. Ili speciale volonte ricevos afiŝojn kun Esperanto-teksto kaj belajn faldfoliojn en la internacia lingvo.

Krome ili petas samideanojn, kiuj havas spertojn en ekspozicioj, doni konsilojn. Ankaŭ aliaj sugestoj ĉiam estos bonvenaj.

Adreso: Esperanto-Komitato por la A.K.U.-festoj, Vondellaan 47, Arnhem (Ned.)

La estraro de IKUE kaj la redaktorino de *Espero Katolika* deziras al ĉiuj niaj membroj kaj legantoj gracoplenan, feliĉan Paskofeston.

Filatelio.

Novajoj por nia kolekto „Religio“.

ARGENTINO: Okaze de la unua Interamerika Maria-Kongreso aperis pm: 1 P., blua; bildo: Nia Kara Sinjorino de Juan, patronino de Argentino. Skizo de *Hector Viola*.

AŬSTRALIO: La pm eldonita je Kristnasko 1960, montras malfermitan biblion kun la teksto: „Behold I bring you good tidings of great joy“ („jen, mi alportas al vi ĝojigan sciigon“).

KOLOMBIO: Kristnasko 1960. Multkolora p.m de 20 c. prezentas la naskiĝon de Kristo en Betlehemo. Skizo de *Mosdossy* laŭ pentraĵo de *G. Vasuez*.

—Tiu ĉi poŝtmarko, sed valoro P. 1,50, aperis en bloko kune kun p.m. de Sta. Isidoro (jam antaŭe menciita), ankaŭ P. 1,50.

—Krom la jam menciitaj p/m pri Sta. Isidoro aperis la valoro de 30 c. La serio konsistas nun el 3 p/m (20 c., 30 c., P. 1,50).

—El la serio „Ruĝa Kruco“: 5 c. ruĝa kaj sepikolora; bildo: Sta. Ludovika de Marillac kaj preĝejo de Nia Kara Sinjorino de Bogota.

KOSTARIKO: Aperigis serion memore de la morto de Sta. Vincenzo de Paŭlo antaŭ 300 jaroj:

10 c., verda: Sta Ludovika de Marillac;

25 c., ruĝa: Sta. Vincenzo de Paŭlo kaj la antaŭa seminario;

50 c., blua: Sta. L. de Marillac kaj sceno en la malsanulejo Sta. Johano de Dio;

1 cr., okrokolora: Sta. Vincenzo kaj la konstruaĵoj de la nova seminario;

5 Cr., sepikolora: Sta Vincenzo en ĝardeno kun siaj protektatoj.

EKVADORO: Kristnaskomarko, 2 d.: la naskiĝo de Kristo en Betlehemo laŭ pentraĵo de Rembrandt.

FRANCUJO: Ruĝa Kruco:

0,20 fr. + 0,10 fr., purpura kaj ruĝa: orumita kurbbastono de la Kongregacio de Sta. Marteno;

0,25 fr. + 0,10 fr., la konata bildo de Sta. Marteno kaj la almozetanto. Ligna statuo en la preĝejo de Sta Marteno en Oise el la XIV-a jarcento. Gravuraĵo de *J. Piel*.

—Okaze de la 500-jara ekzistado de la Kolegio Sta. Barbara aperis pm de 0,30 fr., ruĝa, okrokolora kaj blua. Maldekstre la Sanktulino, en la mezo konstruaĵoj de la Kolegio en Parizo; fondita en 1460 de *Geoffry Lenorinant*.

HISPANUJO: serio „monaĥejoj“:

80 c., malhele verda/verde blua: la monaĥejo de Samos;

1 p., oranĝkolora/brunkarmina: la fontano;

5 p., okrokolora kaj griza: la portalo.

—Kristnaskomarko: La Sankta Familio laŭ *Velasquez*.

—Serio (2 pm) memore de Sta Vincenzo de Paŭlo:

25 c., violblua kaj 1 p., oranĝkolora. Bildo: Sta Vincenzo de Paŭlo kun kelkaj protektatoj.

VATIKANO: Kristnaskoserio, 3 p/m:

10 L., griza kun grize verda kadro;



Esperanto - Kongresoj

XIIIa Fervojista Kongreso de Esperanto, Barcelono, Hispanujo, de 6 - 11.5.1961.
Informojn donas: XIIIa IFEF-Kongreso, Estación Término RENFE, *Barcelono.*
XXIIa Hispana Kongreso de Esperanto, Palma de Mallorca, de 14 - 19.5.1961.
Petu informojn ĉe: S-ro Miguel Arbona, Moral 16, *Palma de Mallorca, Hispanujo.*
La 39a Germana Esperanto - Kongreso okazos je Pentekosto, de 20 - 22.5. 1961,
en *Bad Hersfeld*, situanta en la mezo de Germanujo (hodiaŭ tute apude de la
zona limo, en la okcidenta parto). Eksterlandaj gesamideanoj estas kore invitataj.
Informojn volonte donas la LKK de la Kongreso en *Bad Hersfeld, Unter der*
Stiegel 27 (Germanujo).

La 53-a Franca Nacia Esperanto-Kongreso okazos de 23 - 30.7.1961 en *Epernay.*
La programo enhavas, krom la oficialaj kunvenoj, protestantan kaj katolikan
diservojn, ekskursojn, teatraĵon, balon ktp. Petu informojn ĉe: Nacia Esperanto-
Kongreso de U.E.F. 37, rue des Petits Prés, *Epernay (Marne), Francujo.* *

Internaciaj Feriaj Kursoj okazos de 23 - 30.7.1961 laŭkutime en *Helsingör (Elsi-*
noro), norde de *Kopenhago, Danujo*, kun 5 diversaj sekcioj: daŭriga, konversacia,
rapida, prepara kaj porinfana kursoj. Petu prospekton kun informoj ĉe: s-ro L.
Friis, Ingemansvej 9, *Aabyhøj, Danujo.* *

Niaj protestantaj gefratoj havos sian 14-an KELI-kongreson de 29.7 - 5.8 en
Bishop's Storyford, Herts. Britujo, do tuj antaŭ la 46-a U.K. en Harrogate. Dum
tiu kongreso ili festos la 50-jaran ekzistadon de la *Kristana Esperanto Ligo Inter-*
nacia. Informoj haveblaj ĉe s-ro F. Douglas Murphy, 7 Constable Road, *Ipswich*
(Suffolk), Britujo. *

Aŭtunaj Feriaj Kursoj okazos de 15-22.10.1961 en la Sporta Altlernejo de *Vejle,*
Danujo. Petu tie prospekton. *

15 L., sepikolora, kadro grize bruna;

75 L., blua kun verde blua kadro.

Bildo de la tri markoj: la naskiĝo de Kristo laŭ pentraĵo de Nederlandano:
v. Honthorst (Gherardo delle Notti).

—Memore de Staj. Vincenzo kaj Ludovika de Marillac aperis serio:

40 L., violkolora: Sta. Vincenzo;

70 L., griza: Sta. L. de Marillac;

100 L., bruna: Vincenzo metas troviteton sub la gardadon de la religiuloj
de L. de Marillac.

40 kaj 70 L. laŭ skizoj de *L. Gasbarra*;

100 L. laŭ skizo de *R. Mura.*

—Aperis belega serio, kiu konsistas el la jenaj 7 pm:

15 L., griza: „Nudis praeberere vestem” (vesti la nudulojn);

20 L., karmina: „Peregrinos Hospitio Accipere” (loĝigi fremdulojn);

30 L., blua: „Infirmos Visitare” (viziti malsanulojn);

35 L., brune siringviola: „Carcere detentos Visitare” (helpi kaptitojn);


40 L., oranĝkolora: „Mortuos Sepelire” (entombigi mortintojn);

5 L., brunruĝa: „Famelicis Cibum Dare” (nutri malsatulojn);

10 L., verda: „Sitentibus dare potem” (trinki tiujn kiuj soifas)

—75 L., ruĝa kaj 100 L., blua — 2 pm por la ekspresa servo: blazono de la
Papo.

J. S. JANSEN.



Horizontale:

- A. konsterni (r); fruktarbo (r).
 B. intence aŭ konscie plenuminta ion riproĉindan aŭ punindan; juvelŝtono.
 C. birdo (r); signo de la alfabeto uzata en skribado aŭ presado (r).
 D. difinita aparta okazo; spekulativa rezonado kontraste kun praktika aplikado.
 E. pendigi per hoko (r); prepozicio por esprimi kvanton.
 F. mallarĝa glavo sen tranĉrando por la skermo; brua, entuziasma akcepto por honoro iun (r).
 G. tuto de la disĉiploj de iu majstro aŭ de la adeptoj de iu doktrino; meritante amon (r).
 H. trikita teksaĵo aŭ vesto (r); parto de la buŝo (r).
 I. sidi sur la kalkanoj; loĝejo por brutoj (r).

J. poemo; medio; pagilo, lauleĝe fabrikata por servi kiel aĉetrimedo (r).

K. adverbo.

L. stanco (r); granda rempieda marbirdo (r).

M. planedo; rajdantino.

N. plurbranĉa pendlumigilo (r); senhonte maldeca (r)

O. infekta malsano, karakterizata per fortegaj konvulsioj; moviĝi, turniĝante ĉirkaŭ si mem.

P. korinklino (r); ceremonia vesto de la antikvaj Romanoj (r); prefikso.

Vertikale:

I. vojaĝo, promeno por plezuro, aŭ por scienca celo (r); konsiliĝa;

II. ne posedanta la parolkapablon; oficiala dokumento (r); vandalismo (r)

III. vestaĵo (r); besto; kolekti falintajn foliojn k.t.p. per speciale ilo, provizita de dentoj (r).

IV. sovaĝa porko; poseda pronomo; loko aŭ konstruaĵo, el kiu artefare fluas akvo (r).

V. amfibia besteto (r); floro (r); fajrujo (r).

VI. adverbo; knabo, kies gepatroj mortis (r).

VII. plata, bongusta marfiŝo; adverbo; stato de nacio, kiu ne militas kontraŭ alia (r).

VIII. hakfosilo; araba komandanto;

IX. familiano (r); danco; delikataj, maldikaj plumoj de junaj birdoj (r).

X. ŝmiri per oleo; ŝatata (r); ŝtala ilo, uzata por prilabori malmolajn materiojn (r).

XI. ĝenerala vivmaniero kaj kutima konduto de iu popolo aŭ persono; aroma ŝelo de tropika arbo, uzata kiel spicaĵo (r); ido de korta birdo (r).

XII. metala stangeto, pinta ĉe unu ekstremo, kiun oni uzas por pike fiksi teksaĵoj; membro (r); pronomo.

XIII. monato; skribi mallongan resumon por ne forgesi (imperfekto).

Li de Jong-Roobeek.

Jarlibro 1961

Listo de la Sacerdotoj

Aŭstralio: Patro Cruikshank, nova adreso: Presbytery, Penrith N.S.W.

Belgujo: Louis Muller, nova adreso: paroĥestro Goé-Dolhain (Limburgo)

Francujo: aldonu: Kanoniko Camille Duvaux, 19 rue des Abbesses, Paris-18.

Paroĥestro Ouarnier, Oulchy-Le-Château (Aisne)

forstreku: Patro Jorge Calle, Rue de Babylone 32, Paris-7.

Germanujo: aldonu: Patro Thomas Rudnick S.D.S. Passau-Ilzstadt-Klosterberg.

Polujo: aldonu: Stefano Leks, Saska 2, Kraków.

Patro Stanisław Skorczyński, OMI, Obra, pow. Wolsztyn, woj. Poznań.

Andrzej Ziólek, Ryszewko 30, Pyrzyce Szczec.

Listo de la Konsuloj:

Hispanujo: *Valencia:* s-ro José Guzmán Guzmán, Fern. el Católico 15. Pax Christimovado.

Zaragoza: s-ro prof. d-ro Miguel Sancho Izquierdo, Torrenueva 30, 1º, universitataj aferoj, literaturo, muziko.

Dumvivaj Membroj:

20. S-ro Austin Herschel, Chicago Ill. Usono.

Subtenantoj Membroj:

S-ro Ferenc Gal, Novi Sad, Jugoslavio.

S-ro Austin Herschel, Chicago Ill. Usono.

SEMINARIO POR ĈE-METODAJ INSTRUISTOJ en la kadro de la 46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate (Anglujo), 6-11 aŭgusto 1961

Fariĝis preskaŭ tradicio okazigi seminarion por Ĉe-metodaj instruistoj de Esperanto en kunligo kun la Universalaj Kongresoj de Esperanto, sed nun por la unua fojo ĝi okazos ne antaŭ, sed *dum* la kongreso. Ni faris ĉi tiun ŝanĝon por ŝpari al la partoprenantoj la ekstrajn kostojn de loĝo kaj manĝo en la kongresurbo, kaj ankaŭ por ebligi ŝparon en la vojaĝkostoj al tiuj, kiuj intencas aliĝi al kongreskaravano.

Supozante, ke la seminarioj de s-ro *Andreo Ĉe* jam estas sufiĉe konataj, ni tamen volas aldoni por tiuj, kiuj ne legas multajn Esperanto-gazetojn, ke dum la seminario s-ro Ĉe prezentas la ĉefajn kaj plej karakterizajn partojn de sia kurso por komencantoj, donas informojn kaj klarigojn pri la metodo kaj konsilojn pri la organizo kaj gvidado de la kursoj. La seminario estas destinita por tiaj personoj, kiuj jam scias la lingvon kaj intencas mem instrui ĝin laŭ tiu metodo.

La *lecionoj* de la seminario okazos dum 15 horoj en kvin tagoj de la kongresa semajno (dimanĉo, lundo, mardo, merkredo kaj vendredo) kaj tiel, ke ili *ne estos samtempaj kun la ĉefaj kongresaj aranĝoj*, por ke la seminarianoj povu ĉeesti ĉiujn gravajn kunvenojn, festojn, ekskursojn k.t.p. La horaro de la lecionoj troviĝos en la definitiva programo de la kongreso. Ĉiu seminariano ricevos ateston pri la partopreno.

La ejo de la seminario estos en la *urbodomo de Harrogate* la salono por la kunvenoj de la urba konsilantaro. La konstruaĵo staras vidalvide al la ĉefa Kongresejo, en la plena koro de la urbo.



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11955 - 11925 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 1205 kc/s).

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA;

merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

APRILO 1961

4: Tra la literaturo; 5: Kuriero de Esperanto; 7: „Reviviĝo”, religia himno de A. Manzoni; 11: Novajoj el Italujo; 12: Kuriero de Esperanto; 14: Leterkesto kaj bibliografio; 18: Italaj kanzonoj en Esperanto; 19: Kuriero de Esperanto; 21: Romo kaj ĝiaj kanzonoj; 25: Grandaj italaj poetoj: Torquato Tasso kaj la dramo de lia vivo; 26: Kuriero de Esperanto; 28: Franciskana litreaturo: Tomaso el Celano.

RADIO-STACIO „LA VOĈO DE AMERIKO”

7.4.1961 de 22.00 - 22.30 h. je 31.20 m 9615 kcs kaj 48,62 m. 6170 kcs.

LA ROLO DE LA KONGRESO, DE LA TRIBUNALOJ KAJ DE PUBLIKA OPINIO: Diskuttrondo kun la partopreno de Victor Russell, Speciala Asistanto de Senatano Yarborough el Texas, D-ro Stefan Chobanoff — kiu lastjare ĉeestis la Internacian Foiŝon de Plovdiv, Bulgarujo, nome de la Usona Ministerio de Komerco —, Reed Irvine, oficisto de la Federacia Rezerv-Banka Sistemo, kaj D-ro William Solzbacher, de la Voĉo de Ameriko. — Parolado pri **LA LABORISTA MOVADO KAJ LA KENNEDY-REGISTARO** de Mark Starr, iama Eduka Direktoro de la Internacia Sindikato de Laboristoj pri Virinvestoj (ILGWU-AFL-CIO), iama Vicprezidanto de la Usona Konsila Komisiono pri Eduka Interŝanĝo — li revenis antaŭ nelonge el Singapore, kie li plenumis specialan taskon por la Internacia Labor-Organizo (ILO). — Demandoj kaj Respondoj. Kelkaj detaloj ankoraŭ ne estas deciditaj. Verŝajne partoprenos usonaj kaj eksterlandaj eminentuloj, kies nomoj ankoraŭ ne estas anoncitaj.

Raportoj pri la ricevo kaj opiniesprimoj pri la enhavo estu sendataj al: D-ro William Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528, HEW, Washington 25, D.C., Usono.

La kotizo por la seminario estas 32 steloj (16 ŝilingoj). Britoj povas pagi ĝin al: S-ro Harry W. Holmes O.B.E., 38 Fillebrook Road, London E 11. Aliaj pagu al la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando, aŭ al la landaj reprezentantoj de *Universala Ligo*. La aliĝon, samtempe kun la pago, oni sciigu al la Int. Esp.-Instituto en Hago.

Urĝa peto. — Bonvolu ne prokrasti vian aliĝon, por ke ni povu fari ĝustatempe la necesajn preparojn laŭ la nombro de la partoprenontoj kaj jam antaŭe pretigi la atestojn.

Julia Isbrucker.